

P A C O kaj J U S T E C O

1947

Monata revuo de la grupo B r u g g e .
-----SEKCIO DE FLANDRA
LIGO ESPERANTISTA.

.....

Prezidanto : Drs F. Roose, J. & M. Sabbestr. 12, Brugge-Tel. 31981 .
 Sekretariejo : Roose-De Kersgieter, J. & M. Sabbestr. 12, Brugge. .
 Propagando : Maertens Grég., Nieuwstraat, 54, Assebroek. .
 Po^stkonta : 291429 - Maertens Grég. Assebroek. .

.....

NOVA PROJEKTO : LA AMIKARO DE ESPERANTO.

Nova ideo venis kelkloke ĉe la esperantistaro : la starigo de organizo kiu grupigas la simpatiantojn de E°. Jam ĝi ekzistas en Aŭstrujo. En Sud-Afrika Dro Liebeck pripaŝolis ĝin en "Libera Tribuno". Ni ambaŭmane aplaudas. Ĝi estas efektive urĝe necesa. La Esperanto movado ĉiujare perdas grandan nombron da samideanoj kiuj pro kiuj ajn kaŭzoj ne plu partoprenas niajn movadon kaj agadon. Generale ili restas simpatiaj sed tamen perditaj; ĉiujare la ok dekonoj de la gekursanoj forlasas pro kiuj ajn kaŭzoj niajn kursojn. Ili restas simpatiaj al nia ideo kaj lingvo; tamen perditaj. Tre multaj personoj sentas ekintereson pri E° kiam ili unufoje aŭdas tiun nomon ; tamen pro kiuj ajn kaŭzoj ne komencas la lernadon. Ili volus ja foje ekscii kiel statas tiu problemo de la diverslingveco ĝenerale kaj de E° speciale. Tamen ni neniam gajnas ilin kaj ili neniel kontribuas al la solvo de la problemo. Inter-tempe ni bezonas multajn manojn kaj multan kapitalon. Tion ni devas ŝanĝi. Ni devas iel informi tiujn personojn. Ni devas iel utiligi ilin por nia afero. Tial : "la amikaro de E°". De diversaj flankoj oni jam cerbumis pri iuj ĝeneralaj organizreguloj. Laŭ ni : tio tute ne utilas. La afero estas tro loka. La gvidantoj de nia movado en la diversaj urboj kaj komunumoj devas esplori la eblecojn kaj la dezirindaĵojn. Ni volas tie-ĉi konigi nian ideon pri la plej bona maniero organizi ĝin en niaj regionoj.

1. Oni kunvoku al kunveno unu fojon en du monatoj (eble nur en tri) personojn pri kiuj oni scias ke ili havas intereson por E° kaj influon havantaj personojn, kiel profesorojn, kuracistojn, advokatojn, direktorojn, ĵurnalistojn, k.t.p.
2. La kunveno estu nur informdona.
3. Ĝi estu tamen varia. Dezirinde estas ke pli ol unu persono alparolas la ĉeestantaron. Unu persono dum ĉirkaŭ 15 minutoj prezentas argumentadon pri kaj por niaj ideoj kaj faru tion plej objektivite. Sekvu paŭzo dum kiu oni povas fari demandojn. Venu poste la alia oratoro kiu dum + 15 min. komuniku plej interesajn progresojn de E° kaj lastajn venkojn. Nova paŭzo. Fine parolu tria persono pri la eblecoj kaj tujaj utilecoj de E° sur unu aŭ pli da terenoj de l'homa aktiveco.
4. Oni zorgu ke estu distingiteco en la kunveno. Komforta kaj iom lukseta saloneto. Gravas precipe ke ni varbu personojn el la gvidantaj klasoj. Tute ne utilas en tiu-ĉi kazo la varbado de personoj kies eblecoj estas tre limigitaj. Tiu-ĉi sentenco eble skuetas vin. Sed bone pripensu. Ni estu realistaj. Ĝi tute ne enhavas ion malestimon pri la aliaj klasoj. Vidu ekzemplon de Aŭstrujo en la ĉi-sube aperanta komuniko.
5. Elekte de honorprezidanto, honorkomitato, k.t.p. estas tre bona se tio ne restas nur teoria kaj proforma. Ekzemple, en nia lando, antaŭ la milito (kaj nun ?) la reĝo estis honora prezidanto de Belga Ligo. Sed kion tio alportis ?
6. Kotizo : libervola, -prezaro kun minimumindiko, fiksa aŭ ne : pri tio juĝas la lokaj organizantoj.

Post verkado de tiu-ĉi artikolo, ni ricevis sekvontan komunikadon:

La 7an de Decembro 1946 okazis en Vieno la fonda ĝenerala kunveno de la "Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto".

La societo celas kolekti senkonsidere de deveno, religio, sekso kaj profesio ĉiujn, aŭ Esperantistojn aŭ ne-esperantistojn, kiuj sincere volas kunlabori por la interkompreniĝo de la popoloj kaj starigo de vera pacordo en la mondo kaj kiuj konsideras sia speciala tasko la ideon de universala lingvo, kiu estas nuntempe praktike efektiviĝita en la formo de Esperanto.

Kiel honorprezidanto estas elektita Federacia Kanceliero Inĝenero Leopold Figl, Kiel honoraj vicprezidantoj la Federaciaj ministroj d-ro Hurdas, d-ro Heindl kaj d-ro Frenzel; en la honorkomitato estas elektitaj personoj de la politika, kultura kaj ekonomia vivo de la respubliko Aŭstrio.

La estraron gvidas la societa prezidanto sekcia konsilanto d-ro Maximilian Führung kaj liaj anstataŭantoj Ferdinand Noggler kaj Raimund Cech.

La sidejo de la societo estas en Vieno, 1, Neutorgasse, 9, Aŭstrio.

La fondo de samtaskaj naciaj societoj de amikoj al Esperanto en aliaj landoj estus tre rekomendinda. La estraro volonte donos informojn.

Ni, kun plezuro, publikigas, laŭ demando, ankaŭ ĉi-tiujn tri komunikejn.

1. Honori la Majstron !

S-ro Delaire, el Francujo, ĵus eldonis belegan portreton de nia Majstro (formato 40/50 cm) sur tre bela papero. Estas nun la unua fojo kiam esperantisto havas la ideon grandkvante eldoni grandformatan portreton de Zamenhof, kiu devas loĝi en ĉiuj esperantistaj ejoj kaj ankaŭ en la hejmo de ĉiuj pioniroj.

Prezo aŭfrankite : 120 fr. (aŭ 12 intern. respondkuponoj) Rabato de 20 % po almenaŭ 10 ekzempleroj samtempe. Sendu la mendojn al la direktoro de Esperanto-Oficejo : S-ro Pierre Delaire, 2, rue de Vauquois, ORLEANS (Loiret) Francujo.

2. Esperanto-kursoj ĉe franca radio.

Nia samideano Pierre Delaire, direktoro de Nacia Centro Esperanto-Oficejo, el Orléans (Francujo) sukcesis enkonduki esperanto-kursojn ĉe oficiala franca radio. Liaj kursoj okazos sur 431.7 m. Ĉiun merkredo, de 10 h.15 ĝis 10 h.35, en la programo de la oficialaj instruantaĵoj elsendoj.

3. Aliparte, Esperanto-Oficejo organizis naciĝan konkurson, por la francaj komencantoj, rekompencante la tri sendantojn de la plej bela letero en Esperanto per senpaga vojaĝo al Berna Kongreso. Tiun konkurson anoncis tre gravaj ĉiutagaj gazetoj. Tio alportis al Esperanto-Oficejo plurajn milojn da aliĝpetoj al la perkorespnda kurso.

WAAROM GAAT HET ESPERANTO NIET RAPPER VOORUIT ?

Deze vraag hoort men zeer dikwijls gesteld door mensen die niet in de beweging staan. Zij weten niet wat het E°, bijna dagelijks, bereikt. Vooral in ons land is men onwetend omdat het E° hier inderdaad heel weinig belangstelling geniet. En toch mogen wij ons niet verhelen dat hetgeen wij bereikt hebben nog zeer weinig is als we het vergelijken met wat we nog moeten bekomen. Inderdaad het doel is onze taal te laten erkennen en invoeren door alle regeringen. Dat is heel wat ! En daar gaan we slechts stap na stap naar toe. Mogelijks zegt nu een gewiekste lezer het volgende : Al deze voortuitgangen zijn maar schijnsuccessen. Zoolang het Esperanto niet aangenomen wordt door belangrijke en invloedrijke internationale bijeenkomsten, zoals de U.N.O. Welnu dat gebeurt niet. Dus ! En welke is de reden daarvan ?

Daarop antwoorden wij : dat is inderdaad zóó. Nochtans kan het niet zijn dat zij de wenselijkheid eener neutrale universele wereldtaal niet inzien. Reeds zijn op die internationale con-

gressen zooveel moeijelikheden door de verscheidenheid der talen ontstaan, dat deze alleszins hun ogen moeten geopend hebben. Het kan niet anders, of ze zijn volslagen gek. Langs een andere kant kwamen reeds vaak veel competenties(?) bijeen om die kwestie op te lossen, wel te verstaan met uitsluiting van alle neutrale talen zooals het E°. Tot welk resultaat kwamen zij? Tot absoluut geen. Welnu dan, waarom dan het E° niet aangenomen? Eenvoudig hierom, en er is geen andere reden: omdat zij het Esperanto niet kunnen! Ja, ze hebben nu geen tijd meer, of geen interesse, of geen goesting of wat weet ik al, om die taal nu nog te leren. Konden zij E°, het zou direkt aangenomen zijn. Daarom is de weg, die nog af te leggen is, zeer lang. En daarom moeten wij beginnen met de school. Inderdaad, onder die scholieren die op de klasbanken het E° leren, komen later leidende figuren. Er zijn er nu te veel die, weliswaar het E° uit alle macht steunen, zooals Dr Beners en Kurt Schusschnig, maar toch geen Esperanto kennen. Later echter komen er leidende figuren die wel E° zullen kennen (zooals de Nederlandsche Minister Drees) en vergaderen zij dan eens om over het talenprobleem te beslissen, dan gaat het Esperanto er beslist door. Zoo staat de zaak, waarde lezer, en niet anders.

Welnu, laat ons dan met moed voortwerken. Want stilaan overen wij ook de school. Kijk naar de bemoedigende berichten uit Midden-Europa. Zie naar wat Mevrouw Van Veenendaal-Rouwes bereikt in Nederland.

E S P E R A N T O V E N K O S !
 " _

??
 ??? Angulo de la serĉemuloj.???
 ???

La estraro decidis je fino de 1946 rekompenci la gepartecipintojn al la konkursoj de l'forflugita jaro, por ke eblas fari ekde 1947 novan rangliston laŭ nova punktsistemo. Neniu ion perdis al la afero kaj ĉiuj tielmaniere ekkomencos kun egalaj ŝancoj al la konkurso 1947.

C I N E N I G M O .

A. Por komencantoj :

Por la subaj difinoj formu 16 kvinliterajn radikvortojn komencante ĉiam per la lasta litero de la antaŭa vorto. La unua vorto komencas per la lasta litero de la lasta vorto.

Jen la difinoj :

- | | | |
|---------------------------------------|---|--------------------------|
| 1. oficisto en vendejo aŭ kontoro (R) | - | 2. dolĉa venteto (R) |
| 3. speco de birdo (R) | - | 4. nibilo (R) |
| 5. grandega akvosurfaco (R) | - | 6. vagulo (R) |
| 7. severega (R) | - | 8. venkosigno (R) |
| 9. parto de Francujo (R) | - | 10. ne povante spiri (R) |
| 11. ŝarĝportisto (R) | - | 12. heligi (R) |
| 13. speco da vento (R) | - | 14. metalo (R) |
| 15. speco da birdo (R) | - | 16. falsa hararo |

B. Por ĉiuj :

PUNKTENIGMO.

Anstataŭas laŭ la ĉi-subaj difinoj la krucetoj per vortoj. Se vi trovas la ekzaktajn vortojn vi obtenos de supre malsupre sur la unua krucetvico kaj de malsupre supre sur la lasta krucetvico konatan proverbon (R inter krampoj = radikvorto)

- x x x x = ne prilaborita mineralo
- x x x x = donas gustosento al manĝaĵoj (R)
- x x x x = frukto (R)
- x x x x = komencante de nun
- x x x x = ne foriri (R)
- x x x x = troviĝas en skeleto
- x x x x = riverfiŝo (R)
- x x x x = nukso (R)
- x x x x = verdikta
- x x x x = enloĝanto de Azia lando (R)
- x x x x = ne la sama
- x x x x = kermesbudo (R)
- x x x x = estu dignoplana
- x x x x = muzika ekzercado (R)

-4-

x x x x = gaso (R)
x x x x = longomezurilo
x x x x = japana haverurbo (R)

Solvojn oni sendu plejlaste 3 semajnoj post aperigo de la revuo al la rubrikprizorganto : Iserentant R., Steenweg op Blankenberge, 86, Brugge.

GESAMIDEANOJ ! Por riparado de viaj ŝuoj, nur unu adreso :
HUBERT VAN ROOSEBEKE - Calvariebergstraat, 8,
Brugge - 5 % da rabato.

B O T A N I K O . - Januaro kaj Februaro.

(verkis Gilbert Bruyneel)

Nun ke de nove komenciĝas la amuzadpromenadoj al Ryckevelde, mi vin volas ion rakonti pri tio kion vi povas vidi, kiam vi ludas sur la tereno de Ryckevelde aŭ bone kiam vi preterpasas la arbetaĵojn kiuj kreskas laŭ longe de la vojo.

Ĝi precipe koncernas florojn kaj arbojn kiujn vi povas vidi kaj se vi iam volas ekscii la nomon de floro kiun vi ne konas, vi nur devas demandi al mi.

Ankaŭ la legantoj de nia revuo kiuj ne estas samgrupanoj povas demandi se ili tiam sendas la floron al mi, je adreso : S-ro Bruyneel, Vlamingdam, 121, Brugge.

Nun, en la du unuaj monatoj de la jaro, oni ne jam povas trafi tiel multe da floraĵo, sed mi tamen skribos iomete.

Mi la nomojn de la floroj skribas flandra-kaj latina-lingve, ĉar mi vere ne scias kiel ili nomiĝas en Esperanto.

Kiam oni nun ekpromenas oni vidas ĉie la velkintajn kverkfoliojn (eik). Kiam oni foje rigardas al tio oni preskaŭ subite trovas gajlojn (gallen) sur ĝi.

Jam en aŭtumo falas tiuj gajloj surtere, kiuj kreskis dum la tuta somero kaj restas dum la tuta vintro sub la koto kaj neĝo.

En Marto elvenas de tiuj gajloj nigraj senseksaj vespoj, kiuj metas siajn ovojn en la burĝonoj de la kverkbranĉoj. Kiam nun elvenas la foliara, aperas sur la folioj verdemaj, molegaj, pizo-gajloj grandaj. El tio venas en Junio viraj kaj virinaj bestetoj de vespospeco kiuj malsimilas al la patrinbesteto. La ino tiam kuŝigas siajn ovojn sur la suba parto de la folioj, kiuj malrapide kreskas. En Oktobro la novaj gajloj falas de la folioj. La senseksa speco nomas neuroterus lenticularis, kaj la seksoposedanta speco : neuroterus querus-baccarum.

Nun, mi venas al arbareto kaj tie vi vidas koniferon (naaldboom) kiun vi preskaŭ certe ne jam konas; ĝi estas la Weymouthden (Pinus Strobus); ĝi havas glatan ŝelon, kaj longajn maldikajn bluverdajn pinglojn kiuj staras kvinope.

La pingloj estas triangulo kaj terenfalas ĉiun duan jaron. Tiu konifero venas de Nord-Amerika kaj povas tie atingi ĝis 60 m.

Iomete pli malproksime ni trovas planteton kiun elpuŝas siajn verdajn foliojn supre la neĝtapiŝo; ĝi estas la ordinara eikvaren (Polypodium vulgare) kaj estas filikaco (varenachtig).

La folioj estas 15 ĝis 30 cm. longaj kaj havas sur la dorsflanko grandajn rondajn amasetojn kiuj estas la sporoj (sporen). Oni povas trovi tiun filikon en la dunoj, arbaroj kaj multe sur arbostrunkoj. La radiko gustumas dolĉa kaj estis uzata antaŭe por medikamento. De tie venas la popolnomo : Engelzoet (litera traduko : anĝeldolĉa)

(daŭrigota)

SPRAAKKUNST : op aanvraag ter herhaling.

(-)-(-)-(-)-(-)-(-)-(-)-(-)-(-)-(-)-(-)

De regel van sia.

Dit is weer een moeilijkheid in het Esperanto, zooveel te meer omdat men er toch niet alle gevallen mede kan oplossen. "De moeder heeft haar boek vergeten" heeft, strikt genomen, twee betekenissen. Is het haar eigen boek? of is het het boek van haar vriendin? Het kan gebeuren dat een bepaalde tekst zoodanig opgesteld is, dat er werkelijk twijfel bestaat. Wil het Esperanto dus de taal

hebben een klare en duidelijke taal te zijn, dan moet er middel bestaan die twee beteekenissen uiteen te houden. De regel kan men best zóó formuleeren : als in éen en dezelfde zin (nota : wanneer een zin bestaat uit verschillende aaneen gebrachte zinnen bv. : "mijn broer zag de boekhouding na en de dienstleider telde de zegels na, toen de controleurs zijn bureau binnen kwamen" dan dient men elk afzonderlijk te nemen) het voorwerp dier zin, 't zij het rechtstreeksch voorwerp, 't zij het onrechtstreeksch voorwerp, 't zij een bijwoordelijke bepaling behoort aan het onderwerp dierzelfde zin, dan moet het bezittelijk persoonlijk voornaamwoord (= zijn of haar) onverschillig voor welk geslacht, vertaald worden door "sia" (meervoud = siaj). Behoort dat voorwerp echter niet tot het onderwerp, dan wordt het mannelijk bezittelijk voornaamwoord vertaald door lia (=zijn), het vrouwelijk door ŝia (=haar) en het onzijdig door ĝia (=zijn) en het meervoud voor de drie geslachten (=ilia). In veel gevallen zult gij u veel bedenkens sparen en zult gij dus verder gevorderd zijn, maar dan nog niet altijd, als ge het volgende procédé aanwendt. Kunt gij "zijn" en "haar" vervangen door "zijn eigen" en "haar eigen" dan moet gij "sia" aanwenden, vb. "De moeder vergat haar boek". Als het haar eigen boek is, dat "boek" (=rechtstreeksch voorwerp) behoort aan de moeder (onderwerp): la patrino forĝesis sian libron. In het andere geval : "ŝian libron". Tweede voorb. : "Hij spreekt over zijn ezel en over zijn koppigheid". Er is slechts één zin (want voor twee zinnen moeten er twee gezegden zijn). Moest gij nu vertalen "li parolas pri sia azeno kaj sia obstineco" dan zoudt ge daarmee zeggen dat hij over zijn eigen ezel spreekt en ook over zijn eigen koppigheid. Is het echter over de koppigheid van zijn ezel dat hij spreekt, behoort het tweede onrechtstreeksch voorwerp dus niet aan het onderwerp doch aan het eerste onrechtstreeksch voorwerp, dan hoeft ge voor het eerste onrechtstreeksch voorwerp (ezel) de regel van sia toe te passen, doch voor het tweede niet. Dus : "li parolas pri sia azeno kaj ĝia obstineco". Derde voorb. : De vader wandelt met zijn zoons (zijn eigen) : la patro promenas kun siaj filoj. Vierde voorb. : de vader wandelt met zijn dochters (t.t.z. zijn eigen) : "siaj filinoj" - (T;T;Z. de dochters van zijn vriend) : ...kun liaj filinoj" - (t.t.z. de dochters van zijn buurvrouw) : ...kun ŝiaj filinoj". Vijfde voorb. "DE vader en zijn beide zoons wandelen. ..." "La patro kaj ambaŭ liaj filoj promenas. ..." Waarom niet "siaj" ? Het zijn toch zijn eigen zoons. Omdat "filoj" hier geen voorwerp is in die zin doch mede onderwerp en dat dus de regel van "sia" niet moet toegepast worden. Hier ziet men het onvolledige dier regeling. Want, de zin "de vader wandelt met zijn beide zoons" zou in bepaalde gevallen ook kunnen zijn de zonen van een zijner vrienden; natuurlijk is de betekenis bijna altijd klaar uit de tekst waarin die zin zou voorkomen. Daarom is dat niet zóó erg. Ook beoordeelen wij het voor zooveel als geen fout, als men hier zou schrijven : "la patro kaj ambaŭ siaj filoj promenas". Zesde voorb. : "de meesteres des huizes raadde haar dienares aan haar mantel aan te doen bij dat gure weder". Hoe dit te vertalen ? Schijnbaar is er maar één zin. Feitelijk zijn er twee. Doch van de tweede zin is het onderwerp verzwegen, alhoewel ondervestaan. De dienares is het onderwerp van het gezegde dat zij haar mantel zou aandoen. Vermits in deze tweede zin "mantel" behoort aan het verzwegen onderwerp dierzelfde tweede zin, moet men dus "sia" zetten. Moest de mantel aan de meesteres behooren (= het onderwerp der eerste zin) dan zou men ŝiamoeten zetten. Dus : "la dommastrino konsilis al sia servistino porti sian mantelon dum tiu malvarma vintro".

(wordt vervolgd)

NE OFTE AUDITAJ VORTOJ.

Ni publikigas tie-ĝi "leteron el Belgujo", kiun mi legis en "La Militrezistanto", somero 1946, n°51, paĝo 8; ĝia objektiva tono trafis nin kaj ĝi mentras flankon de la nuna vivo en nia lando kiun ne multaj kuraĝas montri.

"La tempo certe venos kiam, en Belgujo, ni devos koncerni nin pri la demandoj pacifisma kaj militrezista nun post nia spertado de la terura milito kaj la okupado en kondiĉoj kiuj ne povus esti